**PILO-PRESS**

Internacia

Informservo

N-ro 30/77 - 31 jul 1977
Aperas ĉiusemajne

AUGSBURG 1 · 50a SAT Kongreso · Esperanto
30.7.-5.8.1977
31.-7.77-12
8900

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 1
Tel. (0911) 46 36 49; 51 42 69

Abonprezo 30,-- GM

## 50-a SAT-kongreso inaŭgurita

Augsburg (pp) - Dimanĉe, je la 31-a de julio, je la 10-ahoro, kolektiĝis pli ol 300 kongresanoj kaj gastoj en la festsalono de la Urba Domo de Augsburg por solene malfermi la 50-an internacian kongreson de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT).

Post enkondukaj salutaj vortoj de la OKK-estro Hermann Schmid, la urbestro de Augsburg, prof. Fischer, transdonis al la kongreso la salutojn kaj bondezirojn de la ĉefurbestro kaj de la urba konsilantaro de Augsburg. Prof. Fischer diris, ke estas signo de rekono por la kongreso, ke la urbo disponigis por la kongresa inaŭguro tiun juvelon de salono. En sia rimarkinda parolado la urbestro akcentis, ke ni nun vivas en epoko de malfermiĝantaj limoj, ke necesas internacia kunlaboro, sed ankaŭ necesas gardi kaj flegi la naciajn kulturojn. Kvankam li ne estas certa pri la sukceso de Esperanto, li tamen deziris progreson al la strebadoj de la esperantistoj.

Nome de la frakcio de la Socialdemokrata Partio en la urba konsilantaro salutis en Esperanto, Erich Sandner, kiu samtempe estas membro de la Organiza Kongresa Komitato (OKK). Sindikatajn salutojn transdonis s-ro Ulbrich. Parolis ankaŭ reprezentantoj de la Esperanto-movado: Hermann Behrmann por la Germana Esperanto-Asocio, Gerald Tucker por la Germana Esperanto-Instituto kaj s-ro MacGill nome de Universala Esperanto-Asocio kaj TEJO.

Pri la taskoj kaj celoj de la hodiaŭa SAT parolis la membro de la Plenumkomitato de SAT, s-ro Levy. Li diris, ke SAT ne havas oficialan ideologion, ĉiu membro havas propran esprimeblecon. Li aludis la malfacilan situacion de la asocio rilate al la nombro de membroj kaj la aĝa strukturo. SAT ne estu asocio de elito, sed ni ne rezignu fari el SAT amasmovadon. Ne mankas en la asocio ideoj, sed mankas brakoj. Li atentigis pri la sukcesoj de la Mondcivitana Frakcio en Parizo.

En la fina parto de la inaŭguro salutis reprezentantoj de la naciaj laboristaj Esperanto-asocioj, el kiuj kelkaj raportis pri sukcesoj de la Esperanto-movado en la koncerna lando aŭ skizis mallonge la staton de la movado en sia lando. Grandan aplaŭdon provokis la eldiro de s-ino Prent el Britio, ke kelkaj miloj da britoj ne deziras, ke la angla lingvo estu la mondlingvo.

S-ro Gerhard Kunze, por Libera Esperanto-Asocio por Germanlingvio, esprimis la opinion de certe kelkaj aliaj kongresanoj, ke ne venis al Augsburg tro multaj SAT-anoj, pro konataj kaŭzoj, ekz. senlaboreco, malsano ktp. Kiel ĉefan taskon de la kongreso li nomis ne la informadon pri Esperanto, sed la uzon de Esperanto, la laboron per Esperanto, la konversacion kaj paroladon en la lingvo.

Kiel lasta el la parolantoj salutis la organizinto de la 25-a SAT-kongreso en Düsseldof, Hans Pillekamp. Antaŭ 25 jaroj, kiam ni inaŭguris la kongreson, la suno brilis, kaj hodiaŭ la ĉielo ŝutis sitelojn da akvo, li diris. Kaj fakte, pro la pluvego, la anoncita subĉiela koncerto devis okazi antaŭ la malfermo en la granda salono de la urba domo. Ludis blovorkestro sub gvido de Anton Egetmeier, kiu ankaŭ muzike enkadrigis la inaŭguron.

La aranĝon ĉeestis teamo de la Bavara Televido.

Mallonge pri la SAT-kongreso

El la partoprenantoj el 20 landoj ni mencias prof. Gaston Waringhien, prezidanto de la Esperanto-Akademio, prof. Paul Neergard, Kopenhago, kiu prelegas pri la temo: Malevoluo en la evolu-landoj; Dietrich Keuning, eksĉefurbestro de Dortmund; Wilhelm Schmid, iama oficisto de UEA-Centra Oficejo en Rotterdam, nun loĝanta en Japanio; prof. d-ro Augusto Ochoa, Kolombio.

En la kongresejo funkcias speciala poŝtgiĉeto, kiu uzas porokazan stampon kun Esperantoteksto (vidu la titolpaĝon!)

Dimanĉe, la 31-an de julio, je la 17-a horo la ĉefurbestro de Augsburg, Hans Breuer, donis al invititaj kongresanoj el diversaj landoj akcepton.

Merkrede, la 3-an de aŭgusto, TEATRO DE ESPERANTO de PARIZO, ludos la teatraĵon "LA JUSTULOJ" de Albert Camus.

****************

Inaŭguro de la 62-a Universala Kongreso de Esperanto

Rejkjaviko (pp) - Samtage kaj samhore, kiel la SAT-Kongreso, dimanĉe, la 31-an de julio, je la 10-a horo, estis inaŭgurita la 62-a Universala Kongreso de Esperanto en la islanda ĉefurbo Rejkjaviko.

Internacia Konferenco de ILEI

Luksemburgo (pp) - De la 14-a ĝis la 24-a de julio 1977 okazis en Luksemburgo, hotelo "Holiday Inn", la 11-a Internacia Konferenco de Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj (ILEI) kun partoprenantoj el 13 landoj. La konferenco akceptis ampleksan rezolucion, laŭ kiu la partoprenantoj de la konferenco

sekve de la kontaktoj kun la ministeriaj instancoj, urbaj kaj sindikataj reprezentantoj, post atenta pritrakto de la lingvaj problemoj en la socio de la Eŭropa Komunumo,

akceptis unuanime la decidon de UNESKO ke ILEI estu membro kun konsultaj rilatoj en kategorio C, petis la edukinstancojn de Luksemburgio ke oni starigu eksperimentan kurson pri Esperanto almenaŭ en unu klaso de iu elementa lernejo de la lando, petis la urbestron de Esch-sur-Alzette ke oni eksperimente instruu Esperanton en unu klaso de elementa lernejo de la urbo por ke ĝi, post dujara studado, partoprenu la internacian lernejon de ILEI.

Pri la aliaj partoj de la rezolucio ni informos en venonta numero de PP!

Hodiaŭ ni ankoraŭ citu el la privata raporto pri la konferenco de d-ro J. Kondor: "Alian tagon, do vendrede matene.....ni partoprenis en la kunsido de la Estraro sub la prezido de s-ro Ingusz János, Budapeŝto, kie la temo estis: Raporto de la prezidanto, vicprezidanto, ĝenerala sekretario.......Precipe impona estis la raporto de s-ro Dazzini, profesoro en Massa, kiu detale analizis la situacion de la Esperanto-instruado en la plej diversaj landoj de la mondo!.....

Ĉ. la 14,45 h ni forveturas per propraj aŭtomobiloj (preskaŭ ĉiuj portis la verdan stelon antaŭe aŭ malantaŭe, sur la fenestro!) al Esch, al la dua plej granda urbo en Luksemburgio, kie ni vizitis modernan lernejon por korpe kaj mense malhelpitaj infanoj kaj plenkreskuloj. Fine la gvidantaro de la instituto regalis nin per refreŝigaĵoj kaj ni povis demandi pri la lernejo kaj ĝiaj problemoj.....

En la urbodomo akceptis nin la gaja, simpatia urbestro kaj regalis nin per ĉampanjo kaj aliaj trinkaĵoj kaj la sinjorinoj ricevis rozkolorajn diantojn....En la redakcio de Tageblatt longe ni promenadas kaj aŭskultadas la klarigojn de fakulo pri la funkcio de la maŝinoj kaj entute

pri la moderna labormetodo de la uzino. Bonege tradukis ĉiam nia s-ano Wickler! Ĉ. la 21-a horo ni vespermanĝas en restorio de Esch, apud mi sidas la redaktoro de Tageblatt, s-ro Norbert E. Goergen, juna viro, kiu entuziasme parolis pri Esperanto kaj ĝoje verkis la artikolon: Eine Idee ging um die Welt (Ideo ĉirkaŭis la mondon).

Poste ni ĉiuj iris al la redakcio denove kaj en ĝia proksimo, en bela restoracio ni transprenis en amaso la sabatajn eldonojn de Tageblatt, kun la artikolo pri Esperanto kaj fotoj pri la vizito al la redakcio....

Sabate.....tagmeze mi surbendigis la intervjuon, donitan de s-roj Turin, Dazzini, Ingusz kaj Olsson al la Luksemburga Televido en la antaŭa tago. La bonegan intervjuon gvidis juna sinjorino de la televido kaj trafajn respondojn donis al ŝi s-ro Turin, en franca lingvo. S-ro Ingusz parolis en Esperanto pri la Budapeŝta Universitato, kie oni instruas oficiale Esperanton. Tiun ĉi parton tradukis bonege s-ro Turin en la francan!..."

## Esperanto en Radio

Varsovio. Pro la granda distanco inter Rejkjaviko kaj Varsovio la Esperanto-Redakcio de Pola Radio ĉi-foje ne povas elradii rektajn kablajn sonraportojn pri la 62-a Universala Kongreso de Esperanto. Tamen la redakcio havas en la kongreso reprezentanton, B. Staĉak, ĝenerala sekretario de Pola Esperanto-Asocio kaj kunlaboranto de la Esperanto-Redakcio.

Varsovio denove transprenis programeron el la Esperanto-elsendoj de ORF-Vieno. Temis pri la recenzo de la broŝuro "Projekto de internacia aboco por nomoj kaj fremdvortoj" de d-ro Josef Hartl. La recenzon verkis d-ro Karl Beckmann.

### Salutoj al la kongresanoj en Rejkjaviko

En siaj elsendoj dimanĉaj Varsovio kaj Radio Vatikana salutis la kongresanojn kaj esperantistojn en Rejkjaviko. Varsovio ludis honore al la kongreso la Esperanto-himnon.

### Radio Roma kontenta pri korespondaĵoj

En sia dimanĉa elsendo kadre de sia ampleksa leterkesto la Esperanto-redaktoro diris, ke li ĉi-foje estas kontenta pri la nombro de korespondaĵoj. La programo el Romo nun estas sufiĉe bone aŭdebla kaj kompreneb-la.

### Svisa Kurtonda Radio

D-ro Arthur Baur parolas en la kuranta semajno pri la nova botanika ĝardeno de Zurigo; Claude Gacond daŭrigas sian intvju-serion kun Giorgio Silfer, redaktoro de "Literatura Foiro".

### SAT-Kongreso en Bavara Televido

Lunde, la 1-an de aŭgusto, je la 18-a horo La Bavara Televido elsendis mallongan raporton pri la inaŭguro de la SAT-kongreso en la festsalono de la urbodomo de Augsburg.

### Informo de ORF-Vieno

El alskriboj de sinjoroj Najbaro kaj Pickel ni ekscíis, ke Radio Varsovio disaŭdigis pasintdimanĉe la tutan tekston de nia programo de la 4-a de junio. Ni kore dankas al la polaj kolegoj pro tiu por ni sendube varbefika diskonigo de nia labormaniero.

Sinjoro Najbaro skribas: Vere, ĉi-tia kunlaboro inter la du stacioj estas kortuŝa, io apenaŭ kredebla. Kaj sinjoro Pickel jen simile:...ĝojiga signo de bona volo al kunlaboro inter la diversaj stacioj.

D-ro Kondor opinias pri la sama temo: La nobla gesto de Pola Radio, rilate al ORF, meritas ĉies laŭdojn! Ĝi estis vera surprizo por mi, ege agrabla, ĝojiga!

Libera opino

## Pripensoj post 5 jaroj

Post 5-jara periodo, dum kiu mi iom post iom konatiĝis pli-malpli kun la Esperanto-movado, mi ŝatus diskonigi miajn pripensojn pri ĝi. Mi parolas nur pri propraj spertoj kaj verŝajne malpravas pri kelkaj punktoj. Tamen, mi opinias, ke estus interese pritrakti ideojn por plibonigi la nunan situacion.

Ne estas nur neaj punktoj, tute ne! Sed ĉu utilus paroladi ĉefe pri pozitivaj rezultoj?

Du konkludoj miaj eble eknovigos vin:

1) Esperanto ne sufiĉe utilas: laŭ mi, utila lingvo estas tiu per kiu oni povas profesie labori, tiu kiun oni eklernas por plibonigi siajn fakajn konojn.

2) Esperanto-kongresoj ne taŭgas: en siaj nunaj (arkaikaj) vestoj, ili estas nur enuigaj renkontiĝoj, kie oni babiladas multe, laboras iomete, antaŭenigas nenion!

Kion ni povus fari?

1) Pliokupiĝi pri oficiala enkonduko de la Esperanto-instruado en la lernejojn: ne kiel kromhora kurso, sed kiel efektiva fako, deviga aŭ elektebla. Ĝis nun la Esperanto-instruado estas, ĝenerale, nur amatoraĵo kun kompreneble magraj rezultoj. La lernantoj aŭ kontentiĝas pri elementaj konoj, aŭ forlasas la kurson post kelkaj lecionoj. Finfine, la plejmulto de la esperantistoj estas porĉiamaj komencantoj! Male, kiam Esperanto fariĝos lerneja fako, la kurso estos regula kaj fruktodona; la lernantoj ne plu eklernos la lingvon (facila paŝo), sed ellernos ĝin.

2) Plifortigi la fakajn Esperanto-asociojn: Kiuj, ĝis nun, estas nur embrioj kaj povas tre malfacile allogi fakulojn. Necesas, kaj urĝas, riĉigi la fakan Esperanto-literaturon kaj kunlabori pli kaj pli kun neesperantistoj. Kiel? Ekz. organizante dulingvajn internaciajn fakajn kunvenojn (en Esperanto kaj en la lingvo de la lando kie okazas la aranĝo); tiel oni povus inviti neesperantistajn samfakulojn kaj pruvi, praktike, ke Esperanto estas facile uzebla por fakaj celoj. Kompreneble, tiam oni ne plu varbu, sed pritraktu fakajn aferojn, kaj ne plu statuterojn!

3) Renovigi pensmanieron kaj agadojn: oni miras, ke Esperanto-kluboj veteraniĝas sed oni ne demandas sin ĉu la klubaj agadoj estas interesaj kaj allogaj. La programoj ne plu estu kiel antaŭ la lasta mondmilito; intertempe evoluis, kaj evoluas, tre rapide la aĵoj kaj la homoj. Oni laŭiru la kurson de la okazaĵoj.

4) Informi kaj gvidi la gelernantojn laŭ iliaj deziroj. Pro tio necesas demandi ilin pri la kialoj, kiuj instigis ilin eklerni la Internacian Lingvon. Ĉiu ne esperantistiĝas por nur fariĝi estonta Esperanto-pioniro kaj varbanto!

5) Trafe argumentadi: ne plu per vantaj paroloj kaj belaj sloganoj, sed per sciencaj argumentoj, kiujn oni povas ĉiam kontroli. Krome, necesas elekti argumentojn konvenajn al la personeco kaj al la interesoj de la alparolantoj.

6) Ni estu pli efikaj kaj malpli formalemaj: mi demandas vin: Kio estas pli bona: havi modelajn statutojn sen agadoj aŭ agadi sen statutoj? (Rimarko: por multaj esperantistoj la unua solvo estas la plej bona!!)

Germain Pirlot, Kemmelbergstr. 5/b. 3, B-8400 Oostende,
Belgio

*********************

PILO-PRESS, internacia informservo ĉiusemajna, jara abono 30,-- GM
Pagebla al Ludwig Pickel, Postfach 2113, D-8500 Nürnberg 1,
Poŝtĉekkonto Nürnberg 819 56-851